# *Instigas Díaz-Canel ?iujn kubanojn kunlabori discipline kaj respondece fronte al la pandemio*



Havano, apr 7 (RHK) Fronte al la kompleksa scenejo prezentata de Covid-19 en Kubo, la prezidento Miguel Díaz-Canel ratifis la bezonon agi kunlabore, respondece kaj discipline, flanke de la civitanaro kaj de ?iuj institucioj laborantaj fronte al la pandemio.

Dum la taga kunsido, kiun li gvidas kun la ?eministro Manuel Marrero, oni analizis detale la kuntekston travivatan de la insulo pro la nova kronviruso. La ?tatestro insistis pri la graveco ke la civitanaro honeste respondu la enketon faratan, kaj se ili havas simptomojn, ili devas tion diri, a? se iu ajn familiano havas simptomojn same fari, ?ar tio helpos eviti pliajn komplika?ojn.

Li klarigis ke ekzistas beda?rindaj kazoj de pacientoj, kiuj eniris la hospitalojn  en etapoj gravaj a? krizaj, kaj e? forpasis, ?ar ne oportune parolis pri siaj simptomoj. Nia batalo estas por savi la vivon de la homoj kaj eviti propagadon de tiu malsano.

Izoligi ?iujn personojn suspektemajn, potenciale malsani?antajn a? portantajn la malsanon, estas la plej efika maniero  kontroli la propagadon de la malsano.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/219096-instigas-diaz-canel-ciujn-kubanojn-kunlabori-discipline-kaj-respondece-fronte-al-la-pandemio

**Radio Habana Cuba**